

Rasismo

Claude Gacond, 61-a radioprelego, 1964.01.29 & 02.01

Atentu esperantistoj ! Ĉi tie parolas la Svisa Kurtunda Radiostacio pri la rasismo. Vi aŭdas Claude Gacond.

Mi prezentos al vi dum tri elsendoj libron, kiu eble ne estas granda literatura ĉefverko, sed kiu estas unu el la plej homaj dokumentoj pri la interrasaj malamoj. Tiu libro, kiu raportas pri la usona kontraŭnigra rasismo, devas konduki nin repensi niajn rilatojn kun aliaj rasanoj. Estus tro facile profiti el tiu libro por kritiki la sintenon de la usonaj rasistoj, forgesante, ke rasismo estas malsano, kiu ekzistas en ĉiuj societoj, kie pluraj rasoj aŭ lingvoj, etnoj aŭ religioj kunvivadas. Rasismo eble estas unu el la plej akraj problemoj de nia epoko, ĉar ĝin naskas kolektivaj subkonsciaj reagoj. Eĉ se la racio nin kondukas kondamni la rasismon, tiu malsano konstante revenas en nin mem. Simpla frazo kiel ekzemple « la araboj estas mallaboremaj » estas rasisma ĝeneraligo. Ni ĉiuj ofte tendencas eldiri similaĵojn. Tio signifas, ke nia penso estas ankoraŭ sklava de rasaj antaŭjuĝoj, kaj ke se ni devus travivi interrasan konflikton ni tre rapide fariĝus similaj al la rasistoj, kiujn ni iom facile kritikas el malproksime.

De tiuj diroj ne konkludu, ke mi defendas la rasismon. Nur konkludu, ke tio, kion mi priskribos dum tri elsendoj, povus tre bone okazi en alia lando, kaj ke ĝi fakte eĉ okazis antaŭ ne tre longe en Eŭropo, kiam sufiĉis esti judo por perdi la rajton je la vivo. Ankaŭ konkludu, ke rasismo sin kaŝas malantaŭ plej diversaj nomoj : netoleremo, klasfiero, prozelitismo, salajrdiferencigo laŭ la sekso aŭ lingvo aŭ deveno por sama laboro, politika malamo, bezono ridindigi malplimulton, malemo aŭskulti vidpunkton kontraŭan al la propra, kaj tiel plu.

Estas tre malfacile sin meti en la haŭton de aliulo. Tion ĵus faris kun grandega kuraĝo John Howard Griffin, usona psikiatro, kiu naskiĝis en 1920 en Dallas (Teksaso) kaj spirite multe suferis pro la rasapartigo en sia lando. Ideo obsedis lin : « Se blankulo fariĝus nigrulo kaj vivus en ekstrema sudo de Usono, kiel li adaptiĝus al sia nova vivkondiĉo ? Kion oni travivas, kiam oni estas submetata al rasapartigado dependa de haŭt-koloro, do de afero, kiu ne dependas de la volo ? »

Eble multaj aliaj personoj pense imagis tiun demandon. Sed ĝis hodiaŭ mi ne konas personojn, kiuj ŝanĝis sian haŭtkoloron kiel faris s-ro Griffin por sin submeti al kuraĝa eksperimento, tio malgraŭ la riskoj.

La eksperimento de tiu usonano havas du aspektojn. Li konstatis, ke kvankam la blankuloj kaj nigruloj vivadis unu apud la aliaj en la Sudo, ĉiu ajn komuniko inter ambaŭ rasoj simple ĉesis ekzisti. Ĉiu nekonas la alian. La nigrulo de la Sudo ne povas diri la veron al blankulo pro timo vidi la vivon fariĝi ankoraŭ pli netolerebla. Por koni la veron, por rilati kun nigruloj, partopreni iliajn zorgojn racie sin prezentas sola solvo : fariĝi nigrulo. Jen la unua kaŭzo al tiu eksperimento. La dua rilatas certe la profesian formadon de s-ro Griffin. La psikiatro trovis en tiu eksperimento strangan sed tre efikan rimedon por dupersoniĝi. Kiam dum ses semajnoj tagon post tago la nigrulo skribas siajn impresojn, oni ofte sentas la veran Griffin, kiu observas la reagon de la alia Griffin.

Ambaŭ aspektoj de tiu eksperimento estas instruigaj. Ambaŭ estas serĉo al vero. Ili prilumas ne nur la interhomajn rilatojn, ili prilumas ankaŭ la profundajn ofte neatendatajn personajn sentojn de homo en subite perdita malamika mondo.

La ĵurnalo de Griffin komenciĝas la 28-an de oktobro 1959. Tiun tagon li sentas sin vokata fariĝi nigrulo. Lia kuraĝa edzino, kvankam jam patrino, akceptas la riskojn de tiu eksperimento. Publikaĵo por nigruloj helpas lin finance. Fakuloj lin avertas kontraŭ plej diversaj danĝeroj. Eĉ la dermatologo, kiu helpas nigriĝi lian haŭton, hezitas daŭrigi sian kuracadon pro la grandegaj riskoj, kiuj atendas lian strangan pacienton.

Rasismo

Claude Gacond, 61-a radioprelego, 1964.01.29 & 02.01

La 7-an de novembro estas la grava tago. La haŭto malhelningras. Estas la momento razi sian hararon kaj salti en la nigran mondon. Mi citas kelkajn liajn impresojn :

« En la mallumo mi staradis antaŭ la spegulo, mia mano sur la ŝaltilo. Mi devigis min ĝin turni. En lumego pliheligita de blanka kahelaro la vizaĝo kaj ŝultroj de nekonato – sovaĝaspekta kalva malhelega nigrulo – min fikse rigardadas en la spegulo... Mia personeco travivas tiom totalan metamorfozon, ke profunda angoro sentiĝas en mi... Estas malsimila al ĉio de mi antaŭimagita. Mi fariĝis du homoj : unu kiu observas, alia kiu freneziĝas, kiu sin eksentas negroida ĝis internaĵe... La transformiĝo estas perfekta kaj rimedo reveni malantaŭen ne plu ekzistas. Dum kelkaj semajnoj mi devos esti tiu senhara ekmaljuna nigrulo. Mi eksentis grandan solecon, ne ĉar mi estas nigrulo, se ĉar la homo, en kiu mi ĝis nun vivis, la individuo, kiun mi konis, estas kaŝita en la korpo de alia. » (Fino de la citaĵo.)

Nun komenciĝas stranga vivo, kiu certe diskonigis en Usonon multajn faktojn ĝis tiam malbone konatajn. Dum la venonta elsendo mi citos kelkajn el tiuj travivaĵoj. Kiel vi konstatos, ili maltrankviligas nin mem. Verŝajne la kuraĝo de tiu blankulo, kiu sen neceso sin devigis vivi nigrule, komprenigas al ni, ke ni ankaŭ respondecas pri la solviĝo de la rasaj problemoj.

Se vi volas aŭdi la sekvon de tiu prelego pri la rasismo, tiam ne forgesu aŭskulti Radio-Svislandon.

Claude Gacond diras al vi : Ĝis reaŭdo !

-oOo-